

Internacia Libro-Foiro en Jerusalemo

Esperanto impone aperis en la 23-a Internacia Libro-Foiro en Jerusalemo.

La foiro okazis dum tuta semajno (18-23 feb 2007) en la plej prestiĝa konferenca kaj kultura centro „Binjanej Hauma“. Ĝi estas granda evento, okazanta regule ĉiun duan jaron ekde 1963 kaj altiranta milojn da vizitantoj. Esperanto aperis en la foiro unu fojon en la pasinteco, en 1999, antaŭ la 85-a Universala Kongreso okazinta en Tel-Avivo.

En la ĉi-jara foiro (<http://www.jerusalembookfair.com/main.html>) prezentiĝis pli ol 1 200 eldonejoj kaj institucioj. Grandega halo estis rezervita por fremdlingvaj libroj, kie ekspoziciis eldonejoj de pli ol 40 landoj kaj lingvaj-kulturaj institucioj el la tuta mondo. En tiu internacia salono estis reprezentata ankaŭ la internacia lingvo. Esperanto-Ligo en Israelo luis grandan pavilonon, kie estis eksponataj centoj da Esperanto-libroj, gazetoj kaj kompaktdiskoj, scienca kaj faka literaturo, turismaĵoj, vortaroj kaj lernolibroj. Sur la bretoj de la pavilono, kiu portis la oficialan titolon „Esperanto – la internacia lingvo“, la vizitantoj povis impresiĝi de la *Biblio* kaj *Korano* apud *Don Kiĥoto* kaj *La Eta Princo*, *ABZ de Amo* apud *Asteriks*, *Jarlibro de UEA* apud *Esperanto en Perspektivo*. Ili povis aŭskulti Esperantan muzikon, „gustumi“ diversajn komputilajn kursojn kiel „Lernu!“ kaj aŭskulti retajn elsendojn de Radio Polonia, pere de du komputiloj, retkontakto kaj laŭtparoliloj.

La Esperanta pavilono fariĝis unu el la plej aktivaj kaj multe vizitataj en la internacia halo, aparte dank’ al la abundo da materialo kaj viglaj deĵorantoj.

En la pavilono deĵoris ĉiutage almenaŭ 2-3 esperantistoj, de la 10-a matene ĝis la 22-a nokte. Sume volontulis 13 aktivuloj. Multaj aliaj esperantistoj vizitis la foiron. La pavilonon vizitis ĉirkaŭ mil homoj, multaj ricevis informilojn pri Esperanto kaj E-kurso en Jerusalemo (kiu malfermiĝis la sekvan semajnon) kaj pluraj aĉetis elektronikan hebrean kurson aŭ la unuataĝan



koverton de la ĵus emisiita israela poŝtmarko okaze de la 120-jariĝo de Esperanto. Kvankam komerco ne estis la ĉefa celo, la vendoj de esperantaĵoj dum tiu semajno sumiĝis je centoj da eŭroj.

Ĉiutage estis en la foiro riĉa kultura agado. Merkrede prelegis la fama Israela verkisto Amos Oz (aŭtoro de *Rakonto pri Amo kaj Mallumo*), kiu prezentis sian novan novelon baldaŭ aperontan. Amri Wandel, kiu antaŭ sep jaroj invitis Oz al la honora komitato de la UK en Tel Avivo, renkontis lin post la prelego kaj donacis al li la israelan kompaktdiskon *Bonvenu Paco*. Oz ankaŭ subskribis la unuataĝan *Zamenhof*-koverton.

Ĵaŭdo la 22-a de februaro estis la kulmino de Esperanta agado en la foiro: tiam okazis publika prelego de Amri Wandel (sur la suba foto), la ĉeforganizanto de la pavilono, pri *Zamenhof kaj Esperanto: la historio de la internacia lingvo*, altirinta 40 vizitantojn kaj 10 esperantistojn. La prelego aperis (kaj ankoraŭ videblas) en la oficiala retejo de la foiro kaj estis krome reklamita per flugfolioj disdonitaj de niaj deĵorantoj en la foiro. Ĝi daŭris pli ol unu horon. Krome, intervjuoj kaj raportoj aperis en reta elsendo (en kvar lingvoj), en la juda usona ĵurnalo *World Jewish Digest* kaj en longa raportaĵo ĉe loka televido.

Pli frue Wandel partoprenis publikan konferencon pri la kampanjo „Reskribo de la Biblio“ (<http://www.bible-valley.org>), kiun inaŭguris Ŝimon Peres kaj ministrino pri eksteraj aferoj en la unua tago de la foiro, skribante verson en Esperanto el la libro Jesaja. Sekve li diskutis kun Amos Rolnik, la direktoro de la projekto, la eblon lanĉi kampanjon „Reskribo de la Biblio en Esperanto“.

Resume, la publiko montris grandan interesiĝon pri la Internacia Lingvo. La aktiva prezentado de Esperanto en unu el la prestiĝaj kulturaj aranĝoj kreis informadan impeton, kiu espereble daŭros en la proksimaj jaroj. **Amri Wandel**

